

# BELGA ESPERANTISTO

48a Jaro — N-ro 3a — Marto 1956a

Fondita  
en 1908a

Redaktoro-Administranto:  
la Prezidanto de R.B.L.E.:

**Maur. JAUMOTTE**

Avenuo De Bruyn, 44

Wilrijk-Antverpeno

Oficiala monata Organo de

**REGA BELGA LIGO ESPERANTISTA**

Asocio sen profita celo,

aliganta al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO



Abonprezo:  
Fr. 100,-

## Rega Belga Ligo Esperantista

La jarkunsido okazos la 7an de aprilo

La anoj de Rega Belga Ligo Esperantista estas petataj ĉeesti la jaran kunvenon, kiu okazos sabaton, la 7an de aprilo 1956a, je la 16a h., kiel kutime en la „Brasserie de la Justice”, Justeca Placo, Bruselo (tutapude de la Centra Stacidomo).

### Tagordo:

1. Raporto de la administrantaro
2. Aprobo de la bilanco de la jaro 1955a
3. Fiksado de la kotizo
4. Budĝeto 1956a
6. Diversaĵoj.

**Rimarko.** - La Grupoj estas petataj proponi kandidatojn por la administrantaro. Grupanoj, kiuj ne povas ĉeesti la ĝeneralan kunsidon, povas anstataŭigi sin de alia membro, donante al li skriban ateston.

Ni aldonu ke la Grupoj rajtas proponi: „La Verda Stelo” Antverpeno: 4; la Bruĝa Grupo: 2; la Brusela Grupo: 2; la Genta Grupo: 1; la Lieĝa Grupo: 1; la Verviersa Grupo: 1 kaj la Grupo de Charleroi kun la izoluloj: 1 kandidat-administrantojn.

La kunveno ankaŭ rajtos elekti ĝis 6 kooptaj administrantoj, ĉar la administrantoj a, b kaj c nombros 18.

Ĉiu membro povas kandidatiĝi aŭ esti proponata por tia funkcio.

Kondiĉo estas tamen, ke la kandidato antaŭvidu la eblecon helpi iel al la gvidado de la Ligo.

La Prezidanto.

\*\*\*

### Administrantara kunsido

La administrantaro de la Ligo kunvenos en la sama salono, jam je la 14,30a horo kaj, — tuj post la ĝenerala kunsido, — eventuale daŭrigos la preparoladon de la tagordo.

## La kvara Beneluksa Kongreso

La LKK petas ke la personoj kiuj deziras tranokti petu kiel eble plej baldaŭ loĝadon.

Ĝi esperas aperigi proksiman monaton definitivan programon.

\*\*\*

*Akceptis esti membroj de la Honora Komitato:*

**S-ro A. Marien, Provincestro:**

**S-ro L. Merchiers, urbestro de Gent.**

\*\*\*

*La belgaj fervojoj promesas 25 % da rabato.*

### La programo

**SABATON, la 19an de majo**

*13,30a h.: Malfermo de la akceptejo*

*de la 16a ĝis la 18a: Jarkunsidoj de la Belga kaj Flandra Institutoj  
Laborkunsidoj de la Belga kaj Flandra Ligoj*

*je la 20a h.: Oficiala Malfermo*

*je la 21a h.: Promenado laŭlonge de lumigitaj monumentoj*

*je la 22a h.: Interkonatiga vespero kaj agrabla kunesto*

**DIMANĈON, la 20an de majo:**

*je la 9a h.: Malfermo de la akcep-*

*tejo (ĝis la 11a h.)*

*je la 9a h.: Di-servoj (katolika kaj protestanta)*

*je la 10a h.: Jarkunvenoj de la tri Ligoj*

*je la 11,30a h.: Oficiala Akcepto en la Urbdomo*

*je la 12,30a h.: Fotografado*

*je la 13,30a h.: Komuna tagmanĝo*

*je la 15,30a h.: Promenado tra la malnova Gento  
Daŭrigo de la kunveno de LEEN*

*je la 20,30a h.: Festvespero kun la kunlaboro de diversaj grupoj*

**LUNDON, la 21an de majo:**

*je la 10a h.: Diversaj Vizitoj, ĉu al la Gravenkasteel, ĉu al Byloke, ĉu al la Botanika Ĝardeno (laŭplaĉe)*

*je la 12,30a h.: Komuna tagmanĝo*

*je la 14a h.: Vizito al la muzeo de Folklore kaj ĉeesto de mario-neta ludo*

*je la 16,30a h.: Adiaŭa kunveno kaj daŭrigo de agrabla kunesto, por tiuj, kiuj ankoraŭ ne devas foriri.*

*(Artikoloj pri Gento, sur paĝo 18)*

## Maskva respondis en Esperanta

En „Sunday Times” aperis artikolo de ĝia kunlaboranto Viator kaj kiu tekstas en la Esperanta traduko:

**MALANTAŬ LA KURTENO: MOSKVA RESPONDO EN ESPERANTO.** La sekretario de la komunisteca „Japana Popola Konsilantaro por la restarigo de normalaj interrilatoj kun Sovetunio kaj komunista Ĉinujo” sendis atiaŭ nelonge mesaĝon al Moskvo kaj Pekino, petante la kunlaboradon de la tieaj registaroj ĉe kampanjo entreprenata de la nomita organizaĵo. La kampanjo estas komencota la 17-an de marto en Tokio per kunveno.

Molotov respondis per telegramo, promesante sian subtenon al la kam-

panjo. Ĉi tio ne estis surpriza, sed eksterordinara estis la fakto, ke la respondo estis en la angla kaj en Esperanto. Ĉi tio estis la unua fojo, ke soveta registaro rekonis Esperanton kiel internacian lingvon, kaj ŝajnas ke ĝi estas rekonota kiel tia de aliaj komunistaj registaroj.

Ekzistas nacia konsilantaro kun 14 Esperanto-rondoj en Hungarujo, kaj kongreso de Danubaj landoj estas okazigota en Bratislava en julio. La hungara ministro de edukado decidis antaŭ nelonge persmesi la formadon de Esperanto-rondoj en lernejoj. La si-

(Daŭrigo sur paĝo 24)



## Mallonga Historia Skizo pri la urbo GENT

(sekvo)

### 3) La Mezepoko

Jam en la komenco de la deknua jarcento, Gent estis konsiderata kiel la grandurbo de Flandrujo. En ĝi nun loĝas ne nur komercistoj sed ankaŭ metiistoj diversspecaj. Centoj da fremduloj kaj forkurintaj terlaboristoj alvenas. Precipe la teksado iĝas grandindustrio. Notu tamen bone ke ĉiu industrio ĝis la dekoka jarcento estas hejmindustrio. Fabrikoj ankoraŭ ne ekzistas. La loĝantaro tiel kreskas ke formiĝas la hodiaŭa Sta. Mikaelokvartalo kiu situas ekster la, de Leie-kaj Skeldoriveroj, ĉirkaŭita tereno. Oni ĉirkaŭmurigas ĝin kaj sude inter Leie kaj Skeldo oni fosas la nunan Ketelvest (Kaldronofosaĵo). Komence la komercio okazis inter Okcident-Germanujo (por la vino) kaj Anglujo (por la lano). Sed en la dua duono de la dekdka jarcento, Gent atingas la apogon ĉar la drapindustrio kaj komercio ankoraŭ ne konas la teruran konkurencon de la sekvintaj jarcentoj kaj ĉar la bonegkvallita drapo estas eksportata al ĉiuj interesigintaj urboj de Eŭropo.

Nun iom da Genta sociologio. Ekstis baldaŭ grandega diferenco inter la privilegiita komercista klaso kaj la laborista klaso. Jen la ekonomia situacio: la komercisto vendas la lanon al la laboristo por prezo kiun la komercisto indikis. Poste li aĉetis la teksitan lanon denove por prezo de li fiksita. Tio faris ke la kreskinta laborantaro post kelkaj jardekoj komencis luktegon por salajro plialtigo. La politika situacio: la urbestrado estis tute en la manoj de la komercistoj. La grafaj ĉarto de tiuj tempoj klare mencias ke ne manlaboristoj estas allasataj en la skabenaroj. Oni povas kompreni tion por la komenca periodo. La komercistoj estis la fondintoj de la urbo; ili konsideris la laboristojn kiel personojn kiuj vivis dank' al ili. Ili do kredis tute natura ke la estrado restu en iliaj manoj. Kaj ili luktas por gardi tiun privilegiitan

### Novaj deputitoj-esperantistoj en la Franca Parlamento

La Franca Parlamento havas du novajn deputitojn, elektitajn la 2-an de januaro, kiuj estas bonegaj esperantistoj; ili estas s-ro Besson, kiu jam estas urbestro de Moit-de-Marsaa (Landes), kaj s-ro Baylac, kiu estas prezidanto de la Esperanto-Grupo de Marmande (Lot et Garonne). Ni esperas, ke ili sukcesos rekonstrui la Parlamentan Esperanto-Grupon.

(Heroldo 16.2.'56)

pozicion. Intertempe ili iĝis riĉaj kaj konstruis grandajn ŝtonajn domojn kiujn ili fortikigis per fosaĵoj kaj muroj. La grafo baldaŭ konstatis ke ili estas granda forto kun kiu estas utile akordiĝi. Tio daŭris ĝis la fino de dektria jarcento. Tiam venis la granda krizo. En Anglujo ekestis propra teksindustrio. Do ili ne plu aĉetis la teksaĵojn de ni kaj ofte ili eĉ ne plu sendis al ni lanon. Ankaŭ la Duklando Brabanto evoluis kaj la tieaj urboj ankaŭ okupas sin pri teksado. La Gentaj komercistoj devis malaltigi la prezon de la teksaĵoj kaj do volis malaltigi la salajron de la teksistoj. Pro tio la ega lukto inter la du klasoj en Gent dum la dekkvara jarcento. Jam en la komenco de ĉiu jarcento la laborista klaso iĝis konscia pri siaj povo kaj graveco. La batalo de la oraj spronoj (11 Julio 1302) de Flandrujo kontraŭ Francujo en kiu ja batalis ankaŭ komercistoj kaj nobeluloj, estis tamen ĉefe la venko de la urbaj metioj. Sekve preskaŭ ĉie en nia lando la metioj ricevis la rajton havi membrojn en la skabenaroj. Ankaŭ en Gent, kvankam nur malgranda grupo de Gent partoprenis en la batalo. La influo kaj la potenco de la metioj kreskis daŭre tiel ke tiuj metioj inter si luktadis por la hegemonio tiel ke pli kaj pli da komercistoj, komprenante la revolucion kiu efektiviĝas, iĝis membroj de la metioj! Ili esperis tiamaniere daŭrigi sian politikan karieron (ne plu kiel gvidantoj de la komercogildoj sed kiel gvidantoj de metioj!) Sed ĉio tio ne malhelpis la ekonomian malantaŭeniron de Gent.

La situacio iĝis ankoraŭ pli kritika pro la centjara milito inter Francujo kaj Anglujo. Kiam la Flandra grafo volis helpi sian feŭdmaston, la Francan reĝon, la Angla reĝo ne plu permesis sendi lanon al nia lando. Ekregis grandega mizero. Dum la grafo estis en Francujo, Genta burĝo, Jakobo De Artevelde gvidis la sorton de Flandrujo. Unue li sukcesis gardi neŭtralan sintenon por sia lando, sed poste li devis helpi Anglujon. Kvin jarojn post tio, li estis mortigata, en Genta burĝomilito. Kun malmultaj paŭzoj okazis fakte konstante burĝomilitoj. Je ĉiu momento, la Gentaj tekslaboristoj volis organizi la politikan diktatorecon de sia metio en ĉiuj urboj de Flandrujo. La filo de Jakobo, Filipo, iĝis ankaŭ gvidanto de Flandraj ribelantoj kontraŭ la grafo kaj la franca reĝo. Sed ili malvenkis kaj Filipo mem mortis en la batalo en 1332.

(Daŭrigota)

Fernand Roose.

## La Drako sur la Belfrido

Laŭ „GENTIANEN” - aro da malnovaj Gentaj Legendoj

La drako de la Belfrido estas unu el la aĵoj tre gravaj por la Gentanoj. Sed malmultaj ankoraŭ scias ke ni havas ĝin dank' al Balduino IX, kiu estis grafo de Flandrujo kaj ankaŭ Imperiestro de la malproksima Konstantinopolo. Li ja zorgis pri ĝia transportado al niaj regionoj.



La viroj de la Flandra urbeto Biervliet batalis kun la grafo kontraŭ la Turkoj. Tiuj Flandroj tiel kuraĝe kondukis en la plej antaŭaj bataloj — la kuratako — kiel oni karakterize diris — ke la grafo deziris aparte ilin rekompenci. Li donacis al ili unu el la plej belaj akiraĵoj kiujn li kaptis dum la batalo, nome grandegan drakon el kupraj platoj sur fera ĉarpentaĵo.

Neniam oni povis certigi kiun monumenton en Konstantinopolo la legenda birdo ornamis kiam oni ĝin venkakiris de la Turkoj. Iuj diras ke ĝi estis sur la Aya Sofia, aŭ sur la Sta Georgo-preĝejo, aŭ eble sur la palaco „Bucoleon”. Dum la antaŭa jarcento dana profesoro eĉ pretendis ke la drako estis transportita de la reĝo Sigurd Magnussen el Norvegujo al Konstantinopolo.

Kio ajn estas vera, la viroj de Biervliet ne longtempe havis la belegajn imponan ĉar jam post mallonga tempo la Bruĝanoj ĝin akiris.

Sed oni ankaŭ scias ke dum la Mezepoko ne ĉiam la interkonsento inter la urbo de la „reien” (kanaletoj en Bruĝo) kaj Gent estis tre granda; tial, de temp' al tempo, la burĝaroj de ambaŭ urboj interbatalis. Post la batalo de Beverhout kaj la konkero de Bruĝo, Filipo van Artevelde deprenigis la drakon de la „Sta Donaas” turo kaj transveturigis ĝin laŭ la „Lieve” al Gent dum nur kvin tagoj.

La birdo estis lokata sur la pinto de la Belfrido kaj oni devas konfesi ke ĝi nenie pli bone estus. Multaj legendoj ja rakontas pri drakoj kiuj gardas trezorojn! Kaj la Belfrido dum jarcentoj ja estis la gvardejo de la Gentaj dekretoj kaj privilegioj! Tiel oni konsideru la Gentan drakon kiel simblon gardiston de la plej granda trezoro kiun la homoj povas sin imagi: nome la libereco.

## 41-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

KOPENHAGO - (DANLANDO)

4 aŭgusto - 11 aŭgusto 1956

N-ro 4

OFICIALA KOMUNIKO

Februaro 1956

ADRESO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.

BANKO: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.

POSTGIRKONTO: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.

NOVA FAKA KUNVENO: Internacia Asocio de Poŝtmark-kolektantoj, s-ro Ingemar Nordin, Skolvägen 8, Arjäng, Svedujo.

PREZOJ DE LITOJ: Jen provizoraj prezoj.

En Hotelo: Kategorio A 20/40 danaj kronoj)

„ B 14/24 „ „ ) sen matenmanĝo.

„ C 11/16 „ „ )

Ce Privatuloj: proks. 10 danaj kronoj, sen matenmanĝo.

En Komuna Loĝejo: 6 danaj kronoj, kun matenmanĝo.

Disponante ne multajn litojn kaj precipe ne unulitajn ĉambrojn, L.K.K. tre rekomendas la Komunan Loĝejon.

Bonvolu ne mendi antaŭ ol vi ricevos mendilon kun la Dua Oficiala Bulteno en februaro.

LITERATURA KASO: Por apogi la Esperanto-literaturon, L.K.K. decidis aliformigi la Donacan Kason al „Literatura Kaso”. Ĉiu mondonaco alveninta aŭ alvenonta al la Kongreso estos transdonata al la Belarta Konkurso por konsistigi ĝiajn premiojn.

STATISTIKO: (ĝis fino de januaro): Algerio 2, Argentino 1, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 6, Belgujo 4, Brazilo 2, Britujo 97, Ĉeĥoslovakujo 2, Danlando 201, Finnlando 60, Francujo 115, Germanujo 85, Hispanujo 10, Islando 7, Italujo 99, Jugoslavio 53, Kanariaj Insuloj 1, Kanado 2, Kongo 2, Maroko 7, Meksikio 1, Nederlando 53, Norda Rodezio 1, Norvegujo 53, Novzelando 1, Portugalujo 2, Svedujo 179, Svisujo 19, Turkujo 2, Usono 9, Venezuelo 1.

Sumo: 1080 el 31 landoj (pasintjare 900 el 26 landoj).

Gian Carlo Fighiera  
Konstanta Kongresa Sekretario

## Unesko - Novajoj

Paŝo antaŭen en la protekto de la Homaj Rajtoj

La artikolo 25-a de la Eŭropa Konvencio pri Homaj Rajtoj antaŭvidas ke ĉiu individua persono, neregistara organizo aŭ grupo de personoj povas plendi al speciala Komisiono pere de la Ĝenerala Sekretario de la Eŭropa Konsilantaro, se tiu persono, organizo aŭ grupo opinias sin viktimo de iu atako kontraŭa al la Konvencio. Kondiĉo por tiu plendo estas, ke la koncerna ŝtato akceptis la kompetentecon de la Komisiono por tiaj plendoj. Ĝis la nuna momento tian deklaron subskribis 6 ŝtatoj: Belgujo, Danlando, Germana Federacia Respubliko, Islando, Irlando kaj Svedlando. (Laŭ Unesco-Features kaj UEA Infor-Servo)

Sovetaj Sciencistoj esploras Pacifikon

Grupo da sciencistoj de la Oceano-

logia Instituto de la Soveta Akademio de Sciencoj ĵus revenis de du ekspedicioj en la Nordokcidenta Pacifiko. La unuan fojon estis esploritaj profundoj de pli ol 7.000 metroj. La ekspedicio esploris kaj konstatis la strukturon de ĉeno da submaraj montoj kaj kolektis interesajn informojn pri la fiŝlokoj en la regiono.

(Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Inform-Servo)

Eŭropo Konsilantaro kaj Esperanto

La Kultura Komisiono de la Eŭropa Konsilantaro, kunveninta la 25-an de januaro ĵus pasinta en Parizo, unanime aprobis la proponon de rezolucio prezentitan dum oktobro 1955 en Strasburgo al la Eŭropa Konsulta Asembleo pri eksperimenta instruado de Esperanto (vidu Heroldon de 16. 11.55 kaj 16.1.56) kaj elektis kiel raportinton s-inon Rehling el la germana delegacio.

## Tra la Mondo

La 34-a Germana Esperanto Kongreso okazos la 19-an ĝis la 21-an de majo 1956 je Pentekosto en Hamburgo. Ĉiuj informoj haveblaj ĉe la L.K.K. de la Deutscher Esperanto Kongress, Postfach 1237. Hamburg.

La 17-a Hispana Kongreso de Esperanto okazos 25-29 julio en Barcelono. Informojn donas Grupo „Stelo de Paco”, Strato Teruel 28, Barcelono (8).

La 12a Internacia Junular-Kunveno de T.E.J.O. okazos ĉijare en la banurdo Büsum en Germanujo. de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto.

Informoj estas haveblaj ĉe 12-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO, Friedrichstr. 16. Nordseebad Büsum, Germanujo.

La francaj Esperantistoj organizos ĉisomere kombintajn vojaĝojn en Francujo kaj restadojn en la Kulturdomo „Kastelo de Grésillon” Bauge (M.et-L.) Por informoj oni povas skribi al S-ro Watier, 27 rue du Chateau, Rueil-Malmaison (S.et-O) Francujo.

Sveda Esperanto Instituto aranĝos 29 julio—4 aŭgusto 1956, do antaŭ la Universala Kongreso en Kopenhago, Kultursemajnon en Frostavallen. Okazos prelegoj pri diversaj temoj. Prelegantoj estos S-ro Mag. S. Pragan, Amsterdam; Nederlando. D-ro C. Stżp-Bowitz, Oslo, Norvegujo; Prof. G. Waringhien, Choisy-le Roy, Francujo; Prof. D-ro I. Lapenna, Wem-bly, Britujo.

Detalajn informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi ĉe S-ro Jan Strönnne, Amiralsgatan 36, Malmö, Svedujo. Frostavallen situas iom norde de Malmö.

Okaze de la venonta sesio de la Eŭropa Konsulta Asembleo estas aranĝata en Strasburgo ampleksa Esperanto-ekspozicio, por kiu servos unuavice la materialo de la siatempa grandsukcesa ekspozicio en Montevideo (okaze de la Unesko-konferenco). Post interparolado inter s-ro Leleu kaj s-ro Pierre Petit, s-ro Leleu petis s-ron Levy, direktoron de la propagando, ke li mem zorgu pri la ekspozicio. De nun la afero tre urĝas, ĉar la venonta kunveno de la Asembleo preskaŭ certe okazos la 16-an de aprilo 1956.

(Heroldo 16.2.'56)



## BELGA KRONIKO

**Prezidanto:** S-ro Maur. JAUMOTTE, De Bruynlaan, 44. Wiirijk.

**Vicprezidanto-Kasisto:** S-ro J. Soyeur, 91, Rue du Chêne, Seraing.

**Vicprezidantino:** S-ino J. Plyson, 185, rue Jourdan, Bruselo.

**Generala Sekretario:** S-ro H. Sielens, „Internacia Marista Domo“, Faleonrui, 21, Antverpeno.

(Poŝtĉeknumero: R.B.L.E.: 13.37.67)

## ANTVERPENO

**Esperanto-Grupo „La Verda Stelo“**

(Poŝtĉeknumero: 726.54)

Lundon, la 30an de januaro en la lernejo de Belgiĉlei komenciĝis la Perfektiga Kurso gvidata de S-ro Morris De Kete-laere. Ĝi akiris kontentigan sukceson.

Vendredon, la 3an de februaro okazis la parolata ĵurnalo tre amuza.

La 10an la E.K.I. (Esperanto-Komitato Intergrupa) de Antverpeno organizis sian unuan kunvenon de la jaro kaj tiu ĉi altiris centon da samideanoj.

S-ro W. De Schutter, malnova esperantisto, paroladis pri „Kongolando“ kiun li vizitis pasintan jaron dum la vojaĝo de nia reĝo Balduino. Kolorata filmo, verkita de S-ro Bert Van Kerkhoven, la radio-redaktoro, estis prezentata kaj pligrandigis ankoraŭ la mirigajn impresojn kaj ĝojon de la ĉeestantoj. La multnombra publiko kore aplaudis, kiam la Prez. S-ro Maur. Jaumotte elparolis la dankvortojn kaj anoncis novan E.K.I. vesperon por la komenco de majo.

Dimanĉon, la 12an karnavala balo estis organizata al kiu multnombraj membroj partoprenis. Ĉiu faris sian eblon por krei agrablan atmosferon. Multaj estis alivestitaj kaj premioj estis disdonataj al la plej bela, stranga aŭ originala vestaĵoj. Akiris premion: S-ino R. Lecat, Ge-roj Van Nereaux, F-ino M. Ameryckx kaj S-ro J. Vinck. Laŭ agrabla muziko oni dancis ĝis tre malfrue en la vespero. F-ino L. De Winter meritis ĉian laŭdon pro la bona organizo de tiu ĉi balo.

La 17an F-ino H. Hofkens paroladis pri la libro „Batalo kontraŭ la Praarbaro“ verkita de amerikano, membro de ekspedicio al Borneo, Javo kaj Tailando. Estis pri tiu ĉi vojaĝo ke la paroladistino, laŭ tre lerta kaj agrabla maniero, konigis multajn, kelkfoje eĉ strangajn sciindaĵojn: la lumbildoj samtempe prezentitaj pli agrabligis ankoraŭ la atmosferon.

La 24an, S-ro R. Balleux enkondukis debatvesperon pri „Avantaĝoj aŭ malavantaĝoj de la Reklamo“. Li montris la diversajn aspektojn de tiu problemo el kiuj ekestis vigla debato sub lerta gvido de S-ro Maur. Jaumotte.

La 2an de marto, F-ino L. De Keye montris memverkitan filmon koloritan pri sia vojaĝo al la Sankta Lando. Ĝi komentariis

ĝin agrable kaj sprit-maniere kaj citis amason da detaloj, ĉiuj same interesaj. Por surprizi la ĉeestantojn la paroladistino denove montris sian filmon pri la vojaĝo al Jugoslavujo, kiun ŝi faris antaŭ kelkaj jaroj kune kun S-ino G. Debacker kaj la familio Denayer.

La 9an, la prezidanto S-ro Maur. Jaumotte, aranĝis amuzan vesperon kaj sukcesis efektive amuzi la publikon dum pli ol unu horo. La granda aplaŭdo plene esprimis la kontentecon de la ĉeestantoj.

La 16an, S-ro inĝeniero L. Deroisy paroladis pri „La Fabrikado de la Zipo.“ Li historion de tiu skizis la fermilo kaj per multaj modeloj li montris la evoluon kaj kreskadon. Por fini li detale klarigis la tre precizan funkciadon de la zipo. Varma aplaŭdo kaj dankvortoj de la prezidanto konkludis tiun interesan vesperon.

**Programo de la venontaj kunsidoj:**

Ĉiuvendrede en „Witte Leeuw“, Frankrijklei 4, je la 20.30a h. (1a etaĝo).

**Aprilo:** La 6an: Parolata ĵurnalo: Dimanĉon, la 8an: je la 15a horo: vizito de la ekspozicio „La Stano“ en la muzeo Sterckxhof, Hooftvunderlei, 160 Deurne; la 13an: Parolado de S-ino L. Merckx pri „Kolonijaj Pioniroj“; La 20an: Amuza Vespero; La 27an: Parolado kun lumbildoj de S-ro A. Verhoeven, pri la malsanulejo „Sankta Elisabeth“.

**Majo:** la 4an: 2a E.K.I.-vespero: „Meksikio“, parolado kun lumbildoj de S-ro Fr. Van Doren; Jaŭdon, la 10an (ĉieliran tagon): Ekskurso al Bouwel; La 11an: Parolado de S-ino R. Lecat, pri „Albert Einstein“; la 18an: Kabareta Vespero; la 19an, 20an kaj 21an: partopreno al la Kongreso

Por sia vintra provizo

Por sia antracita karbo

la Esperantistoj mendas

ĉe

**BELGOMINE**

FRANKRIJKLEI, 20

ANTVERPENO

kiu donas specialan premion

## G. FAES

16, Schoenmarkt, 16

ANTVERPENO

— Por via MUZIKO  
RADIO kaj GRAMOFONO

en Gentio: la 25an: Raporto pri tiu ĉi kongreso.

## BRUGO

**Bruĝa Grupo Esperantista**

(Poŝtĉeknumero: 4835.33)

Ekzameno pri legado okazis la 24an de januaro kaj skriba ekzameno la 31an. Diplomoj pri elementa lernado estis disdonataj la 7an de februaro al la jenaj sukcesintaj ekzamenitoj: (laŭ alfabeto ordo) F-inoj Bonte Cécile, Cortoys Irène, Mantelers Simone, Poupeye Yvonne, Roose Maria, Van Vyve Andrée, Verraes Marie-Louise, Wijbouw Georgette kaj S-roj Behaeghel Raoul, Lagast Robert, Speyter broodt Herman, Van Hecke Georges. Ĉar pli frue la grupo ne posedis diplomojn, la sama lernad-atesto estis nun aljuĝata al kelkaj membroj, kiuj ekzameniĝis dum antaŭaj jaroj, nome al: (laŭ alfabeto ordo) F-inoj Herreweghe Maria, Van Belleghem Lucienne, Van Parys Isabelle. Van Parys Yolande kaj S-roj. Demeulenaere David, De Scheemaeker Gilbert, Lenoir Fernand, Poupeye Karlo kaj Poupeye Marcel.

Ekskurso al la karnavalo de Heist, programita por la 14a de februaro, ne okazis, ĉar la ega frosta kaj neĝa vetero tro malvarmigis la entuziasmon de la gemembroj. Kelkaj fideluloj tamen kunsidis en la kunveno kaj okupiĝis pri legado kaj klarigado de tekstoj.

La kunveno de la 21a de februaro estis dediĉata unue al preparo de la balo de la 25a kaj fine al amuza portretludado.

La dua grupa balo de la sezono okazis la 25an de februaro en la salonego „Concordia“. Malgraŭ la lasta ofensivo de la vintra malvarmo, la sukceso de tiu balo preterpasis la plej optimismajn antaŭvidojn, tiel ke, jam de nun, datoj estas fiksataj por la du baloj de la venonta sezono.

Tiu sukceso estis ĝoje preparolata dum la kunveno de la 28a, dum kiu ankaŭ tekstoj el B.E. estis legataj kaj klarigataj. Je tiu dato devis komenciĝi nova kurso, sed pro la malbona vetero kaj pro provizora manko de taŭga salono, tiu kurso estis prokrastata ĝis la 20a de marto (vidu progra-

## Funebro

La 25an de februaro, subite mortis en Nieuwpoort, S-ro Leon BRAET, entreprenisto, la ĉiam fervora pioniro de la esperanta movado en Nieuwpoort kaj kunorganizinto de la belga kongreso, kiu tie okazis en 1931. Li estis bone konata de multaj malnovaj samideanoj kaj speciale en Bruĝo, kie estis la ĉefa centro de lia profesia aktiveco.

Je lia memoro okazis, la 11-an de marto en la preĝejo S-ta Jozefo en Bruĝo, diservo ĉeestata de granda popolamaso, inter kiu delegacio de la Bruĝa Grupo.

Al liaj gefamilianoj kaj precipe al liaj infanoj, niaj samideanoj Ges-roj Carlos Braet-Amerlinck kaj Ges-roj Marcel Braet-Delrue, ni prezentas la esprimon de nia plej kora kunsento.

mon).

Muzika vespero okazis la 6an de marto per disaŭdigo de kelkaj artaj diskoj precipe kun komponaĵoj de Mozart.

**Programo de la sekvontaj kunvenoj:**

**ATENTU, GRAVA SANGO:** De nun ĝis septembro, pro ne disponebleco de granda salono en nia sidejo „Gouden Hoorn — Cornet d'Or“, la kunveno kaj lecionoj okazos ĉiutage, je la 20a, en provizora kunveno: „CONCORDIA“ Zuidzandstr. 5, Tel. 366.24, salono la etaĝo, dekstre.

**Marto:** la 20an: a) Malfermo de nova kurso aranĝata samtempe por komencantoj kaj por progresantoj. Ĉiu membro varbu kaj alkonduku almenaŭ unu novan lernanton. — b) Interkonatiĝo inter la novaj gelernantoj kaj la aliaj gemembroj; la 27an: a) leciono; b) Parolata gazeto.

**Aprilo:** la 3an: a) leciono; b) Muzika vespero; la 10an: a) leciono; b) Portretludado; la 17an: a) leciono; b) Parolado de S-ro Rob. Lagast pri Radiestezio; la 24an: a) leciono; b) Parolata gazeto.

**Majo:** la 1an: Laborfestoj, kunveno ne okazos; la 2an: (merkredon) a) leciono; b) Muzika vespero; la 8an: a) leciono; b) Raportado pri la kermesa foiro; la 15an: a) leciono; b) Lastaj aranĝoj por la Beneluksa Kongreso; la 19-20-21ajn: Beneluksa Kongreso en Gentio; la 22an: a) leciono; b) Raportado pri la Beneluksa Kongreso; la 29an: a) leciono; b) Parolata gazeto.

**Kondolencoj:**

— Al S-ino G. JOYE-DEBACKERE, membrino de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ŝia maljuna patro, S-ro Henri Debackere (8/2/56).

— Al S-ro Advokato kaj al S-ino R. DE PAUW-SUIY, gemembroj de la Bruĝa Grupo, pro la morto de ilia amata fileto Patrick (25/2/56).

## Mia Patrino

Via koro estis fonto de nobleco Riĉega je donadoj mirindaj, Via vivo estis fonto de boneco, De amo kaj simpleco laŭdintaj.

Via simpleco enhavis trezorminon, Por ni ĝi estis la virta vojo Kiŭ al ni komprenigis veran vivon Kun graveco kaj modesta ĝojo.

Via amo estis la plej pura dono Kiun patrino povas oferi, Vi scias, diru do, Mia Patrino, Kia amo povus ĝin superi.

Via boneco estis delikateco De kiu la koro elbordigis, Tiu nobla koro, ho eterna nedaŭreco, Silentas nun, ĉar vivo rompiĝis.

(traduko de lia poezio „Moeder“ publikigita en 1932 en la bulteno de la flandraj kuracistoj „Moeder en kind“)

Willem Pollez

## BRUSELO

**Esperantista Brusela Grupo**

(Poŝtĉeknumero: 1230.48)

La 16an de januaro okazis perfektiga kurso de S-ro Van der Stempel, kiu instruis la finaĵojn de la ŝlosilvortoj: -a, -o, -u.

La 23an sekvis prelego de S-ino Elly Staes pri „La vivo de Mozart“. Ŝi donis multajn opiniojn de diversaj aŭtoroj. Poste oni aŭdigis kelkajn diskojn.

La 30an okazis la oficiala jarkunsido de Brusela Grupo. La prezidanto, la sekretario kaj la kasisto legis siajn raportojn la grupo voĉdonis la kotizon por la jaro 1957, kaj malsarĝis la komitaton. La voĉdono por elekto de komitatanoj donis jenan rezulton:

Estis re- aŭ alelektitaj S-roj Jacobs Jirousek, Piron, Schumacher kaj Van der Stempel, S-ino Weyn kaj S-ro Wylie.

La 6an de februaro, la prezidanto konigis la kunmeton de la nova komitato. Prezidanto: S-ro Jacobs.

Vicprezidantino: S-ino Weyn.

Sekretario: S-ro Jirousek.

Helpsekretario: S-ro Wylie.

Kasisto: S-ro Schumacher.

Komitatanoj: S-ro Vander Stempel.

S-ro Piron.

Sekvis la jam fama „Parolata Ĵurnalo“.

La 13an, S-ino Stern interesigis nin per parolado pri „Cesar Frank kaj lia epoko“ kun samtempa diskturigo; tiu nova sis-

## LES ENTREPRISES

## DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO

Tel.: 15.19.92

Entrepreno de

KONSTRUAĴOJ

temo multe plaĉis.

La 20an, oni vizitis la S.A.T.-amikaron. Ni ĝuis paroladon de S-ro Strinchant.

La 27an, Karnavalsvesperon S-ino Castel organizis dum kiu ŝi disdonis siajn bon-gustajn kukojn S-ino Weijn pliagrabligis ankoraŭ la vesperon per la sonbenda aparato. Ni kune faris romanon, kaj dancis.

La 5an de marto sekvis la parolata ĵurnalo, kies cel-plumon akiris S-ro Vander Stempel per „La hundo de Montargis“.

La 12an, S-ro Jirousek pritraktis „Kvar Jaroj vegetarano“ kun alvoko al pli bona sano kaj al la koro mildigebla de la esperantistoj.

**Programo de la venontaj kunsidoj**

Esperantista Brusela Grupo, 38 place du Grand Sablon, la etaĝo.

**Aprilo:** la 9an: Parolata ĵurnalo; la 16an: Perfektiga kurso de S-ro Vander Stempel; la 23an: Skota vespero organizota de S-ro Wylie; la 30an: Nova serio: Ĉiujn 5an lundon de la monato okazos „Diskutvespero“, dum kiu oni interdiskutos pasintan temon de la monato. Ĉiu sin preparu.

**Majo:** la 7an: Parolata ĵurnalo; la 14an: Perfektiga kurso de S-ro Vander Stempel; la 28an: Amuza vespero organizata de S-ino Weyn.

## LIEGO

Mardon la 28-an de februaro, en salono de la tre agema societo „LA BESACE“ (turisma organizaĵo), rue Vinave d'Ile (ejo de la Liberala Domo), D-ro Pol DE-NOEL, vicprezidanto de la Lieĝa Grupo, faris tre interesan konferencon pri Esperanto kaj ĝiaj facilaj kaj avantaĝoj por la turistoj.

Ĉeestis ĉirkaŭ 60 personoj, el kiuj multaj ĝejnuloj.

Post la parolado, pluraj personoj petis informojn pri la ebleco sekvi kurson.

Verreries et Miroiterie DESMECHT & C°

LA LOUVIERE

S.P.R.L.

Tel. n-roj 223.01 - 225.37

Du esperantaj markoj:

TABULO, por lernejtubuloj; KATOKULO, por signalvitroj.



# Kelkaj Rakontoj

## Kuŝas viro apud la vojo

Ĝi okazis ie apud malgranda urbo. Malmulte da trafiko preterpasis. Du knabinoj — Anjo kaj Manjo — iris bicikle hejmen post vizito al teatro en la urbeto.

Subite ili aŭdis ne kutiman bruon. Alproksimiĝinte ili vidis motorciklon starantan ĉe la vojrandoj. Virino kriis: „Ho ni veturis kontraŭ iun eble li estas morta.” Viro staris apud senmova figuro de iu biciklinto, kiu kuŝis sur la herborando. Anjo la plej energia tuj ekagis.

„Ĉu vundita?” „Jes”, „ĉu grave?” „Mi ne scias”, „Almenaŭ ni telefonu kuraciston kaj la policon”. Dirinte tion ŝi rapidis al domo je kelka distanco de la akcidenta loko.

Virino malfermis. „Kuŝas viro apud la vojo. Akcidento. Ĉu mi eble povas telefoni tie ĉi?” „Jes, helpu vin mem, jen la aparato” mallonge komentis la virino.

Sed Anjo kiu estis iom nerv-streĉita pro la vidita vundito ne tuj povis trovi la ĝustajn nomojn kaj numeron de iu kuracisto.

„Ĉu eble vi povas helpi min?” ŝi petis la virinon. Kontraŭvole la alparolitino faris tion. Videble ŝi ne tre ŝatis tian ĝenon.

„Ho”, Anjo ekpensis — „ni bezonas litkovrilon por la kompatindulo”. „Ĉu vi havas kovrilon por mi?” ŝi demandis la dommastrinon. „Prenu tiun de sur la sofo” iom malafable respondis tiu. „Sed tiu estas multe tro malgranda” protestis Anjo.

„Supre en la dormĉambro kuŝas pli grandaj, pli malafable diris la virino, sed ne kunprenu la plej novan, prenu tiun flikitan, tiu certe taŭgos.” Kiam Anjo forlasis la domon ŝi aŭdis post ŝi la vokon: „Sed zorgu, — ke oni redonu ĝin al mi”. Intertempe pli da preterpasantoj grupiĝis ĉirkaŭ la motorciklo apud kiu ankoraŭ kuŝis la ŝajne senviva biciklinto. Unu el ili — post rigardo — iris al la domo de la nehulpema virino.

„He, sinjorino Peters, vi bonvolu iri ekstever, estas via edzo, kiu kuŝas tie!”

„Ho kara Dipatrino” larme ekkriis la virino — kaj nun ŝi kuris — kuris.

Intertempe la kuracista veturilo alvenis oni ŝovis la vunditon en ĝin. Ankau la polico estis aktiva kaj demandis la motoriston pri la kaŭzo de la akcidento. La aŭto jam iris for kiam la virino alvenis — nur Anjo kaj Manjo staris ĉe siaj bicikloj, pretaj por daŭrigi la vojaĝon. „Helpu min, helpu min” la virino nur povis diri senspire. „Ne — seke respondis

Anjo, „antaŭe vi ne volis tutkore nin helpi, nun ni ne plu helpos vin.”

Dirinte tion ŝi transdonis al la edzino la flikitan litkovrilon.

Kaj hejmen la du iris, dumvoje meditante pri la vivo, kiu ofte metas surprizojn sur nian vojon!

(Historia)

Jan van Twuiver.

## La Surgrundiĝo de Anjo \*)

Estis nokto. Antaŭ horo la motorŝipo Anjo pasis Lazerurbon kaj nun ĝi pasis je distanco de 3 marmejloj Kabon Verdan. De ĉi-tie oni ŝanĝis la direkton ĝis 130° komparse, do en la direkto de Ludvighaveno.

Anjo estis Ebenlanda ŝipo, apartenanta al la Martransport-Kompanio „Navigado.”

La 15an de Decembro, Anjo forlasis Fohnemaz kun kargo da cemento por Masthaveno.

Dum Anjo pasis Kabon Verdan, la vetero estis bona kaj serena, la vento estis N.O. 3. Je la 3.30 horo la kapitano ekvidis baborde la brilon de la lumoturo de Porto Granda. Je la 4a la kapitano transdonis la deĵoron al la direktisto kaj ordonis averti lin ĝustatempe por anki sur la rodo de Porto Granda. La rapideco de la ŝipo estis 10 mejloj t.e. plenforte

antaŭen.

La kapitano indikis al la direktisto la lumbrilon kiu tiam estis rekte antaŭe, kaj rimarkigis ke proksime apud la bordo povus esti fluo. „Nu, bonan deĵoron nav”, mi iras litten” adiaŭis la kapitano kaj iris malsupren.

La direktisto regule kontrolis la direkton sed, nepre ne bone — la ĉirkaŭaĵoj, ĉar la turlumo rapide alproksimiĝis. Kial li ne manovras? Ankau la 2 ĉe li deĵorantaj maristoj ne atentigis lin. Subite la navigisto vidis la bordon tute proksima antaŭe! Li puŝis la telegrafon sur „plenforte malantaŭen, la motoro ekretroturnis, sed..... skuo, la ŝipo surgrundiĝis! La kapitano, pro la skuoj ekstimigita, kuris al la komandejo kaj vidis tiam, ke la ŝipo surgrundiĝis proksimume 2 mejlojn norde de Porto Granda. Ĝi ne sukcesis liberiĝi per helice kaj rudromanovroj, ĉar la maro defluis. Post radio-alvoko venis la motorsipo „Reg’haveno” en la proksimon, sed antaŭ kiam ĉi-tiu ŝipo povis fari ion, Anjo iĝis libernaĝa dum alfluanta tajdo. La ŝipo ne enlasis akvon kaj alkajiĝis sen pluaj akcidentoj en Porto Granda.

K. Ruig.

\*) Tiu ĉi rakonto estas laŭvera historieto, sed mi ŝanĝis la nomojn kaj daton (aŭt.)

## Bibliografio

### Fortŝpruca Arda Liriko el Klara Fonto

MARJORIE BOULTON. — „Kontralte” orig. poemaro — antaŭparolo de W. Auld — Kovrilo de J. Hartley — portreto de la aŭtorino — STAFETO n-ro 5 — J. Régulo, eldonisto — La Laguna, Kanariaj Insuloj — 1955 288 p. Prezo: 1.80 us. dol. Havebla ĉe via Libroservo.

Kiam la germanino Marie Hänkel aperigis en 1911 dudek du poemetojn („Sableroj”) verkitaĵojn ekde 1906, Kabo heroldis, ke „ŝia reĝina moŝto ĝojigis sian popolon per siaj verkoj”. Efektive la reĝino (de la Floraj Ludoj) estis la unua poetino en nia literaturo.

Depost tiu aminda, romantika talento kaj tre modesta komenco estis nur notindaj dudek du jaroj poste, kun nemultaj versaĵoj, la nomoj de la estonino Hilda Dresen, pro ŝiaj melankolie puraj versoj, kaj de Amalia Nunez Dubus, hispanino, rimarkinde verkinta el filozofia grundo, kaj nun — denove post iom pli ol dudek jaroj — surprize aperis sur nia verda

## Subfajra Promenado

Antaŭ multaj jaroj mi venis de la kantklubo en Vlielando. Ĉar pluvis, mi uzis la pluvombreton. Kantante la novajn melodiojn mi marŝis hejmen. Sed kio estis tio? Estis fajrero sur la pinto de mia ombrelo. Strange! Mi tuŝis ĝin fingre sed la sparko ne malaperis. Ja venis ankoraŭ sparko sur alia pinto, kaj jen ankoraŭ unu. Mi pli rapide ekmarŝis, volante montri tion-ĉi hejme.

Sed vidante flanken, mi vidis ke kelkaj ŝipoj en la haveno havas saman sparkon sur la masto. Guste kiam mi suriris la havendigon la fajro malaperis.

Mi estis marŝinta sub la sankt’ Elmufajro.

Tradukis: K. Ruig.

Insulano.

ŝpirito, sed por „karnulo”, metante la akcenton ĝuste sur la karnan plenumon ĉar „paroli pri la amo nur spirita terure riskas ŝajni hipokrita”... ŝia reĝino moŝto (de la Belarta Konkurso de UEA) ĝojigos sian popolon” aŭ eble... „fremdaj, skandalaj ŝajnas ŝiaj (miaj) revoj”...

Ja tio, kio de tiom da poetoj tiele estas direktata al la virino kutime nevolonte toleriĝas, kiam tiu ĉi ĝin same reciprokas. Tamen tiu neordinara kuraĝo konfesi publike meritis respektan kaj kompatan, kaj tia virina inspiro, ne laŭtradicie larmoglanda aŭ amindaĵa, espereble vekas almenaŭ eĝan interesigon kiel ĝi surprizatale rekta, neniam kruda sed realisme drasta, naskis lirikon preskaŭ sensimbolan („senvesti min de amo kaj edukon por iĝi etulin’ en urintuko”; „mia fenditaĵo kora -viando por la katoj, ĉu valora?”) foje kun trafa bildo aŭ komparo („se kanto rajdas nun sur mia spiro”) sed foje ankaŭ riskuŝante eufemisman emfazon („brulegantaj korkrateroj; flamaĵ torturduncoj en la vejno, pastrino en deliro rita” k.s.)

Absoluta ĝojo aŭ malĝojo mutigas. Kiam poeto sin esprimas li distilis el la la realeco tion, kio fermentinta sur kora fundo, ricevis propran vivon. En kelkaj longaj versaĵoj la poetino restas, malgraŭ pasiaj krioj, la racie realista detalanto de riĉa gamo de kontraŭaj sed konverĝaj sentoj kaj deziroj, kiuj precipe ricevis propran vivon en kvietiginta korpejzaĝo per plimallongaj poemoj.

Siatempe Marie Hänkel paroligis la rozujon, simbolon de l’ amo: „Ne tuŝu, ne ŝiru floraron, la mian; mi pikos, mi vundos la manon la vian; pro amo mi miajn floretojn defendos, pro amo mi miajn pikilojn forsendos.” Marjorie Boulton, reprenante la ripozon el la konsekvenco mem de sia spita ago (Mistero de Amo) „Sed nun mi konas la ripozon. Per tiu sama sanginundo. Rigardu! Per la ruĝa

vundo. Mi nun posedas mian rozon.”

Elreviĝe post suferoj ŝi „almenaŭ (mi) en disŝirita kor’ ankoraŭ (mian) propran memon savis”, kaj metas malvarman fingron sur la vundon de la homa soleco, la fokuso de l’moderna literaturo („Alieco”, „Soleco”, „Spiegulimago”). Sed la plibona ebleco de l’homa ekzistado ŝin fortunigas de narcisismo kaj vana plorado („Kuraĝajn stelojn povas mi adori... ĉar mi neniam aŭdis stelojn plori”; „Mi volis esti saĝa kaj racia, digna, kuraĝa, ne ploraĉe bleka”) kaj la dignan taskon, kvazaŭ patrinecan surrogaton, ŝi trovis al la edukado de junulinoj, taskon gravan sed nostalgian pro la ĉiama rekomenco...

En „Trista Tenereco” ŝi kun rimarkinda facileco priskribas en 28 sonetoj, dediĉitaj al ŝiaj studentinoj (kiuj prefere ankoraŭ ne legu iujn poemojn!) siajn komprenemajn rilatojn kun ili; lertfluaĵoj sonetoj en kiuj la natura esprimmaniero tamen ne malofte impresas sufiĉe proza: „La disciplino estas formulo kiu pretendas ke, dum intelekta epoko de la vivo, plena perfekta morale estas ĉiu studentino”. Cetere kurioza trajto de la aŭtorino estas tio, kion ni nomu ŝia lektorina rezona intelekto, sin manifestanta meze de plej korbŝiraj sentesprimoj per subita meminterrompa demando kaj subra konjunkcio.

...Kaj krii nur en mio hor’ magia, Ho kara, kara! Via, via, via! Ĉu mi dezirus? Nu, malkaŝe, jes. Sed, pro honoro, mankas la permes’. Ĉu mi dezirus tion? Jes, kaj tre. Ĉu estas eble? Plejprobable, ne.

Sed verdire kia distanco jam depost la periodo, en kiuj raciaj profesoroj unufoje proklamis versludis! Marjorie Boulton, kiu riĉas je vera sentimento, estas esenca poeto en sia duobla apero: „mi estas ebenaĵo kaj vulkano”. Vulkana, la memsufiĉe grava sed iom monotone flua lafo de ŝiaj „erupcioj” laŭnature solidiĝas. En la ebenajo kontraŭe pli reliefigas „la formo” en perletoj de naturobservo kaj meditemo.

La verdaj folioj  
Iĝas brunaj.  
Miaj brunaj haroj  
Iĝas aŭtunaj  
Per grizaj strioj.  
Ho jaroj!

aŭ ridetas humoro speciala, ĉar „Doktoro Lapenna, kvazaŭ goril’ freneza gestas”, aŭ sprita, ĉar ŝia eldonisto (kun varma loko en la koro por la poetoj) „Ĵen ora birdo — kanario... kantas en Akademio”.

Malgraŭ pro poeto stranga konfeso ankoraŭ ne ĝisfunde estis la lingvan instrumenton, stranga kiel sunkulpigo, ke ŝi tial ne emis krei...novajn vortojn, la aŭtorino en nia literaturo unuajete lasis la kutiman „promeson” malproksime post si per diversaj

## KORESPONDADO

S.ro Edward Dembski, Stargard Szez al Bolojannisa 7/2. Polujo, deziras korespondi pri belliteraturo, filosofio ktp.

S.ro George Bérout, 22-jara franca studento de juro, 20 Quai Perrache, Lyon (Rhône) deziras korespondi kun ned. fraŭlino.

stradoj por ekscii la ĝustan situacion;

Deziras korespondi kun la tuta mondo pri poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj, jenaj esperantistinoj, ĉiuj loĝantaj en Barbacena-M.G., Brazilo (Sud-Ameriko): Fino Ruth Abrantes Quintao, rua Floriano Peixoto, 128; Fino Maria Aparecida de Sousa, Rua Dr. Pena, 258; Fino Maria Adelaide Franca de Paiva, Rua Floriano Peixoto, 60 kaj Fino Assunta Martoni, rua Cesario Alvim, 18.

admirindaj poemoj el profunda animo, lertmetiaj kun ofte postvibra finverso. „Amaraj Sonetoj”, „Nenaskotaj Infanoj” kaj pluraj aliaj, eĉ ŝia unua „Marborda Stono” estas plenumiĝoj kiuj antaŭvidigas prosperan pluan evoluon en harmonia ekvilibro inter sentoj kaj spirito, koro kaj pensoj, ĝis ankoraŭ pligranda verstensio, en la penetra eksterigo de la virina psiĥo, per eble ankoraŭ pli kerneca kaj konciza esprimvarieto.

Ke la inde eldonita poemaro, uniktona en nia lingvo, estu la posedaĵo de ĉiu spiritmatura poeziĝuant(in)o, estas nia sincera deziro. Tyneverum.

\*\*\*

Tartarin de Taraskono, de Alphonse Daudet tradukita de Jean Deŝor kaj Paul Le Brun. Eld. de Heroldo de Esperanto. Prezo F. 6,60.

Jen nun el la famaj libroj francaj aperis unu en Esperanta traduko. La esperantistoj tutmondaj povas ĝoji pri tio, ĉar la enhavo estas tre interesa kaj donas bildon pri la karaktero de la sudfranca popolo, kiu estas gaja, optimisma kaj iom fanfarona. Ridige estas legi la preparojn, kiujn la heroo faras por iri al leonĉasado en Afriko, kie li erare mortigas azeneton. Alphonse Daudet (1840-1897) akiris per ĉi tiu libro, kiu aperis en 1872 grandan famon kaj ni memoras ke ofte ĝi en antaŭaj jaroj troviĝis sur la literaturlisto franca por ĝelernantoj de niaj mezgradaj lernejoj. La stilo de la esperanta traduko estas bona kaj glata. Multaj notoj malantaŭe en la libro klarigas sufiĉe multajn neofte uzatajn vortojn kaj esprimojn, kiuj ne estas troveblaj en Plena Vortaro, sed laŭ nia opinio la tradukistoj iom tro libere aliformis francajn vortojn en esperantaj. La verko estas ilustrita per dek tutaĵaj ilustraĵoj, kiuj ne estas tre belaj. Cetere ni povas tre rekomendi la libron.



## Bibliografio

### Vortaro ESPERANTO-français

Post plurfoja vana promeso pri reeldono de la vortaro Grosjean-Maupin, ni havas la plezuron informi nian klientaron ke ni nun ricevis definitivajn informojn de la eldonintoj. Ne aperos reeldono, sed unua eldono de nova vortaro, kompilita de profesoro G. WARINGHIEN, Direktoro de la sekcio „Vortaro” de la esperantista Akademio. La nova verko ampleksos proksimume 500 paĝojn, 13,5 x 19 cm., sur bonkvalita paparo, bone legeblaj litertipoj kaj fortika tola bindo. Prezo por antaŭmendoj ĝis la 15a de Aprilo: Fr. 237,— afrankite.

La volumo français-Esperanto kun ĝia suplemento de Grosjean-Maupin restas havebla je Fr. 144,—.

Antaŭmendojn kaj pagojn oni adresu al: BELGA ESPERANTO-INSTITUTO, Oostenstr. 26, ANTWERPEN. Pck. No. 1689,58

(Sekvo de p. 17)

*dejo de la Komunista Mondfederacio Junulara en Budapest proponis Esperanton kiel unu el siaj oficialaj lingvoj por la venontjara Junulara Festivalo en Moskvo.*

*Klarigon por ĝia populareco donis hungara radio-parolanto, kiu priskribis ĝin kiel preparon por la tempo, kiam „sociaj kaj ekonomiaj baroj inter la popoloj estos rompitaĵoj” kaj universala lingvo estos farita ebla.*

Multaj jam demandis al si kial okazis tiu laŭsajne sensacia ŝanĝo en la sinteno de la rusaj gvidantoj. Povas esti ke, pro influo de esperantistoj en la „Japana Popolo Konsilantaro”, ĉi tiu organizado direktis sian mesaĝon al la sovetaj kaj ĉina registaroj en la angla lingvo kaj en Esperanto, kaj ke la sovetaj registaro tradukigis al si la tekstojn kaj, siavice, komisiis iun kompetentan esperantiston en Moskvo traduki la respondon en la internacian lingvon kaj ke, sekve, ankaŭ la respondo de Molotov, kiel raportis „Sunday Times”, estis en la angla kaj en Esperanto. Sed estas ankaŭ eble, ke la sovetuniaj gvidantoj, ekkoninte la grandegajn avantaĝojn, kiujn povus doni al ili ĉe la sekvado de iliaj celoj la uzado de Esperanto, decidis mem ekuzi tiun promesplenan instrumenton, por doni per tio ekzemplon al siaj popoloj kaj ties amikoj kaj la instigon komenci vastan lernadon kaj disvastigon de la internacia lingvo, por ilia propra profito kaj tiu de la tuta progresema mondo.

En ĉi tiu rilato estas interesa an-

## LISTO DE LA MEMBROJ-KOMERCISTOJ

### Antverpeno

„In 't Duifken” (S-ano Paesmans), Lge Koepoortstr. 64: Kostumoj (5 0/0 rab.)  
**Vino Max Bolsius**, Diepestraat 58-60, Antverpeno: Kuirejilaro. Tel. 32.57.85  
**M. Phillips**, Karel Rogierstr. 1, Antverpeno. Korsetoj - Rab. 5-10% por la membroj.  
**P. van der Hoydonck-van den Buys**, Kapelsesteenweg 549, St. Mariaburg.  
 ŝuoj — Teksaĵoj — Merceraĵoj. Tel. 74.27.86  
**J. Montmirail**, Kortemarkstraat 53, Berchem. Arlitekto. Tel. 39.58.66  
**Morris de Ketelaere**, Oostenstraat 25, Antverpeno. Hemiaĵoj. Tel. 39.17.09  
**S-ino Henny Jacques-de Ketelaere**, Beeldekenstr. 31, Antverpeno. Gramofonaj diskoj por meminstruado. Tel. 33.75.38  
**Roger Jaumotte**, Cyriel Buyssestr. 44, Antv. Anoncoj en tagjurnaloj. Tel. 37.47.14  
**K. Amerijckx**, Melgesdreef 40, Merksem. Centra Hejtado. Tel. 45.81.07  
**R. Vanistendael**, Dambruggestraat 234, Antverpeno. Okulvitroj — Rab. 5 0/0  
**CL. Peeters**, Onderwijsstraat 68, Antverpeno. Apotekejo. Tel. 35.40.67  
**L. Van Reybrouck**, Venusstraat 33, Antverpeno: ĉiŝp. iloj por la hejmo. Tel. 32.43.88  
**Firmo van Iseghem & Verstraeten**, St. Bernardsesteenweg 631, Hoboken.  
 Vitraĵoj — Speguloj — Tel. 37.88.20  
**J. van Nereaux**, Sterstraat 1, Antverpeno. Viandisto. Tel. 39.55.81  
**J. van Nereaux**, Sterstraat 1, Antverpeno. Aŭtoĉar-ekspluado. Tel. 39.20.59  
**H. Peeters**, Vordensteistr. 58, Schoten. Ingen.: Neon-lumo, Reklamoj. T. 81.48.47  
**H. Jacques**, Lange Beeldekenstraat 31, Antverpeno. Presaĵoj. Tel. 33.75.38  
**Verdijck**, St. Rochusstraat 174, Deurne. Ĉiaj asekuroj kaj hipotekoj. Tel. 39.06.07  
**P. Peelman**, Volkstraat 34, Antverpeno. Fumaĵoj — Pantofloj. Tel. 37.62.55  
**Y. Ameryckx**, Helmstraat 154, Borgerhout. Peltaĵoj  
**M. Blajwas**, Simonsstraat 40, Antverpeno. Frizisto. Tel. 32.13.18  
**S-ro A. van den Neste**, Deurnebaas 30, Merksem. Presad-inkoj. Tel. 45.78.59

### Brugo

**Marcel Poupeye**, Elf Julistr. 31. Ĉiaj asekuroj en la tuta lando. Tel. 371.93  
**Charcuterie Strovi**, Vlamingstr. 48 (Teatroplaco) Viandvaroj. Tel. 334.08  
**Malson Joye**, Gelmuntstr. 29. Cemizoj, Gantoj, Kravatoj. Tel. 332.75  
**Firmo G. Verbeke**, spinolarei 19: Konstrumaterialoj. Specialaĵo: naturŝtono de Jura. Tel. 321.85  
**Pan- kaj Kukbakisto R. ROSSEEL**, Mariastraat 30, Konsumsalono. Tel. 338.34

### Bruselo

**Farmaciisto Jacobs**, 94, rue général Eenens Bruxelles 3 15.26.01  
**Farmaciisto N. Nelis**, Meise 59.13.73  
**„BONBONS SWINNE”**, 77, rue de Nieuwenhove 44.57.36  
**Imprimerie Liéens**, 18, rue de la Princesse 21.10.98  
**CARRELAGE „Carrart”**, 19, avenue de Saxe 21.74.49  
**Viajn MEBLOJN ĉe S-ro Weyn**, aĉetu rue Destouvelles, 57 15.96.97  
**Libroj, Publikajoj, ĵurnaloj**, F-ino Kestens 24, rue Bodenbroeck 11.71.03  
**Tinkturejo, senmakuligejo „TEX”** 11, Av. du Couronnement,  
 Woluwe St. Lambert 70.75.82

### KOMERCISTOJ kiuj senkoste propagandas por Esperanto per reklamojn en siaj butikoj

**G. Baeten**, Belpairestraat 53, Berchem. Tel. 39.22.81. Frizisto por sinjorinoj  
**„De Boerinekens”** (Clem. Van Hassel). Estro de la trinkejo en la Flandra Operdomo  
**A. Roels**, Montignystraat 155, Antverpeno. Ledaj artikloj-Selisto. Tel. 37.14.07  
**G. Goemaere**, P. Genardstraat 39, Antverpeno. Speciejo, laktojo  
**Vandersmissen**, Kampioenstr. 11, Antverpeno. Paperaĵoj, parfumaĵoj  
**Van Kerckhoven**, Grote steenweg 63, Berchem. Fornoj; forĝaĵoj  
**R. Scheerdijk**, Oude Vaartplaats 34, Antverpeno. Snuroj; lignaj ŝuoj; lanternoj gardenilaro  
**Butiko Angora**, (galerio), Huidevettersstr. Antverpeno. Luksaj pantofloj, sportŝuoj  
**Librejo Schuttershof**, Schuttershofstr. 36, Antv.: luo, aĉeto, vendo de libroj  
**Vojaĝ-agentejo Pier Bussetti**, Hopland 5, Antv.: privataj kaj grupvojaĝoj

kaŭ la fakto ke Radio Wien disvastigis informon, laŭ kiu Molotov en letero al grava funkciulo en Britujo (ĉu Eden?) uzis Esperanton.

P.S. - La supra artikolo jam estis kompostita, kiam alvenis la sciigo, ke s-ro Kan Majima, la ĝenerala sekretario de la Japana Popola Konsilantaro, en telegramo al Londono konfirmis la verecon de la informo pri la telegramo de Molotov. Oni ankaŭ informis nin, ke „American Broadcasting Company” dissendis per sia re-

taro la 25.1. vespere je 19.35 (Novjorka horo) intervjuon, kiun ĝia Londona agento havis kun s-ro J. Leslie, la sekretario de Brita Esperantista Asocio, sekve de la Molotova telegramo. Multaj ĵurnaloj dume jam reprenis parte la artikolon de „Sunday Times” pri la Molotova telegramo aŭ simple publikigis la fakton. Ankaŭ la Informa Fakto de UEA (Internacia Gazetara Servo-) rapide reagis, dissendante komentan artikolon destinitan por la ĵurnalaro.